

Israelaj esperantistoj kongresis en Cezareo

Jam la 12-an fojon renkontiĝis la esperantistoj en Israelo en aranĝo, kiu antaŭe nomiĝis KIES, kaj poste ŝanĝis sian nomon al Israela Kongreso.

La kongreso okazis en la antikva urbo Cezareo 7-9 apr 2011. Plue okazis postkongresa ekskurso por la eksterlandaj gastoj (10-13 apr).

Partoprenis pli ol 42 personoj, la plej juna estis 2-jara (Omer, la denaska filo de Eran), kaj la plej aĝa 90-jara (Rolf Bergh el Norvegio). La kleriga programo enhavis i.a. prelegojn pri “Kulturaj aspektoj en interhoma komunikado” (Kristin Tytगत el Belgio), “La analiza skolo” de Herman Behrmann (Germanio) kaj “Esperanto en Svislando, de Privat ĝis Piron” de Bruno Graf el Svislando. Okazis ankaŭ diversaj distraj programeroj, kiel debato pri “Esperanto en la ombro de la angla” gvidata de Amri Wandel, kvizo de Josi Shemer, logika socia ludo de Gian Piero, sinprezento de la pentristo Joni kaj deklamado de Aleks Kerbel. La ĉefaj ekskursoj okazis vendrede al la muzeo de neleĝa enmigrado, al la rivero de



Partoprenantoj de la 12-a Kongreso de esperantistoj en Cezareo

la krokodiloj, kaj sabate al la antikva romi-tempa restaŭrita urbo Cezareo, kiu revenigis nin al la tempo de la reĝo Herodo. La tradicia resuma forumo okazis per fotoj, en kiuj la kongresanoj povis resperti la okazintaĵojn dum la kongreso. La kongreson kunorganizis Nava, Esti, Amri kaj Josi, kiuj dankas al ĉiuj helpintoj kaj kontribuintoj.

Dum la kvartaga postkongresa ekskurso la eksterlandaj gastoj vizitis la Mortan Maron (Kumran, la oazo Ein Gedi, Masado, la lasta ribelejo kontraŭ la romianoj, kaj sin banis flosante en la plej sala maro de la mondo), la aventuran dezertan kanjonon Barak, la Ruĝan

Maron kaj Eilat, la ravan ruĝan kanjonon kaj la klifegojn de la dezerta montara urbeto Micpe Ramon. En la lasta tago oni kun Esti vizitis Jerusalemon – aparte la malnovan urbon, kaj povis fermi la ciklon spektante la rulaĵojn de la Morta Maro, trovitajn en Kumran en la novigita muzeo de Israelo. La aranĝojn organizis kaj ĉiĉeronis

Amri Wandel

Pliaj fotoj pri la kongreso videblas ĉe: <https://picasaweb.google.com/104206151883892331911/IsraelaKongreso2011>, kaj pri la postkongreso ĉe <http://picasaweb.google.com/104206151883892331911/IsraelaPostKongreso2011>.